


**AVENO 47** Decembro 2021

**Karaj geamikoj,**

jen tute koncize – detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, paco-politiko, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj pri Verdaj Partioj troviĝas en la jaraj kolektoj de nia semajna reta AVE-Novaĵoj, same kiel ampleksa kolekto da tiaj dokumentoj en Esperanto en nia retejo: verduloj.org/aveno.htm
La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en CSO, respektive Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni subtenas Per-Esperanto-Agadon inter alie en Tanzanio, Burundio kaj D.R. Kongo.

**Estontaj renkontiĝoj de AVE-anoj:**
2023-06 Seulo (KR), teamo de AVE ĉe movada foiro de Tutmondaj Verduloj: www.globalgreens.org
2022-06-03/06 Oldenburg (Old.) okaze de Germana & Nederlanda Esperanto-Kongresoj.
2022 virtuala UK, Belfast - Montreal

**Okazis inter aliaj:**
2021 virtuala UK kaj GEK, AVE kunsidoj
2020-06-12 Virtuala konsilio de European Greens
2019-07-20 Lahti (FI), UK, kunveno de AVE
2019-07-11 BET, Panevezys (LT): prelego pri plastajhoj & akvaroj
2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE-informtablo je movada foiro
2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), teamo de AVE ĉe la Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: pri lingva justeco ene de la Verduloj: greens2017.org
2015-07-27 **Lille,** Francio, 100a UK, publika kunsido temoj: Agendo 21, Daŭripovo & Esperanto-Movado.

**Niaj Celoj:** La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon.
AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj (au NRO-oj) pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ni informas niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj (vidu en nia bulteno AVENO 34).
.
**Kunlaboro:** AVE kunlaboras kun UEA kaj SAT, krome kun diversaj Civil-Sociaj Organizaĵoj kaj kun la Verdaj Partioj de landa, kontinenta kaj globala nivelo.

**Agado:** Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo. Temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, nemilita konflikt-solvado.

**Per-Esperanto-Agado:**
UN lanĉis la 17 Celojn de Daurigebla Evoluo ghis 2030 (CDE/ sustainable development goals, SDG). AVE sekvas ilin rilate edukadon, daŭripovon, rearbarigon - kunlaboras kun esperantistoj en pluraj landoj kaj subtenas iliajn evoluajn projektojn, ekz-e :
: “Mazingira Salama/Ketare” de Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio;
: “Akvo por Kalima” de PIEADC, Etienne Katchelewa en Kalima & gestudentoj en Goma, SBV, DR Kongo;
: “Rearbarigo” Uvira DRK, Niger, k.a.
www.verduloj.org/afriko.htm

Ni subtenas la **Verdajn Partiojn tutmonde:**
Deklaracio de Liverpool 2017 ;
Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar), www.globalgreens.org/globalcharter ;
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.) ;
Programo de la Europa Verda Partio, 2006;
Manifestoj de 2009 kaj 2014;
Verdula Libro, Verda/EFA Verda Frakcio de la Europa Parlamento 2004-2009

: **tradukado** de gravaj tekstoj de la **Verda Movado**
100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio (kun multaj ligiloj)
Plastajhoj en la akvaroj & kemiajhoj en la plastajhoj.
Bonvolu viziti nian retejon:
www.verduloj.org/dokument.htm

**Diskutejoj: Verduloj** trovighas sur Ipernity.com, rekte: www.ipernity.com/group/227876
kaj **Verduloj.Telegramo.org**

Por **membriĝi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn Celojn. AVE havas pli ol 300 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivas (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio por nia statistiko. Prefere membriĝu en Verda Partio de via lando - ligoj al kontinentaj federacioj de Tutmondaj Verduloj: globalgreens.org/federations

**Kotizo:** Nia jara kotizo estas libervole paginda - propono: 10 EUR, plia donaco por nia evolusubtena agado CDE bonvenas. UEA-Konto de AVE: „avex-z“ au pere de la konto de UEA che ABN-Amro Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99,
BIC/SWIFT: ABNANL2A ,
Bonvolu mencii: (por Konto avex-z, de "*via nomo*")

AVE sekretario: Manfred Westermayer
Weissdornweg 68
DE-53177 Bonn
ave@verduloj.org
retejoj: verduloj.org
nova: verdularo.wordpress.com

**AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.**